

Mi jam estis trafoluminta la libreton antaŭ la aŭtoro prezentado. Impresis min la densigita formo de speciala demando, kiun *Tiŝljar* jam aludis en siaj antaŭaj verkoj "Duobla Spiralo" (1991) kaj "Esperanto vivas malgraŭ la Esperantistoj" (1997), nome kiel pli efike klarigi al personoj, kiuj ne parolas Esperanton - kaj precipe al politikistoj - la karakteron, valoron kaj celon de neŭtrala transnacia eŭropa lingvo.

La nuntempa Eŭropo Unio estas matura. Tamen preskaŭ ĉiu unuopa membroŝtato pensas pri propralandaĵaj avantaĝoj pere de membreco. Tie kuŝas la malkompreno de subsidiareca pensado kaj la bazaj problemoj de eŭropa unueco. La plej granda ĝisnuna manko de Eŭropo estas definitiva normlingvo kiel komunikilo kaj identecsigno por Eŭropanoj. Estas tiu lasta funkcio de unueca lingvo, kiu pleje gravas kaj kiun ne povas anstataŭi iu ajn de la grandaj naciaj lingvoj, kiom vaste ĝi estu jam parolata - ĉu politike, science, komputile, ĉu interjunulare, lerneje, eduke, ĉu internacie, restoracie, flughavene.

Dum debatoj pri Esperanto kiel komuna eŭropa lingvo, post legado de la libreto de *Tiŝljar* oni ne plu fanfaronos pri facila, nur kelksemajna ellerno de Esperanto ĝis plena posedo (kio ne veras), pri nur 16 reguloj por posedi la Esperantan gramatikon (kies ĝustaj aplikoj ne estas tiom facilaj), aŭ pri la interesperantista unueco kaj samececo (kio estas absoluta malvera revo).

La baza trajto de "Eŭropa Ideologio" estas, ke transnacia Esperanto kiel "Eŭroloingvo" evoluigus propran Eŭropan individuecon kaj kungluus la Eŭropanojn al specifa socia organismo, kiu ŝatos kaj protektos la etnajn diversecojn kaj forte malakceptas ekskludi el la eŭropa komunumo malgrandajn naciajn kulturojn kaj lingvojn pro daŭra dominado de iu politike, ekonomie kaj homamase forta sed al iu nacio apartenanta, nacia lingvo. Esperanto garantius egalecon de ĉiuj naciaj lingvoj en estonta internacia komunika ordo.

Al tiaj gravaj bazaj pensoj, kiuj transtrenas en dek-du ĉapitroj la libreton kiel ruĝa fadeno, sekvas kiel dek-tria ĉapitro la de *Tiŝljar* 1995 iniciatita "Eŭropa Manifesto". Mi dubas, ĉu aldono de tiu lasta ĉapitro nepre necesis, ĉar temas pri apliko de idearo kun la ĉefa principo de subsidiareco en kultura kaj lingva politiko. Tion la aŭtoro jam bone priskribis en la antaŭaj ĉapitroj. Kritikendas ankaŭ kelkaj forlasoj de la temo je la librofino kaj malplialtiĝo de la komence skrupula lingva ekzakteco. Sed tiu manko estas solvebla en sekva eldono.

Kiel poŝformata libreto "Eŭropa Ideologio" ne nur apartenu en la poŝon de ĉiu eŭropane pensanta Esperantisto, sed oni devas preni ĝin plejble ofte el la poŝo en la manon por studi kaj pripensi, ĉu eblas iam estonte "eŭropa identeco".

R. Sachs

## Impresoj el KAEST 2000

Mi partoprenis la "Kolokvon pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" (KAEST), kiu okazis en Prago novembre 2000, kaj renkontis tie aron da interesaj kaj simpatiaj homoj, aŭdis dudekon da diversfakaj prelegoj kaj konatiĝis kun la nuna stato de la fakmedia esperantista movado. En la oficiala malferma parolo *Petr Chrdle*, la ĉefa organizanto de la aranĝo aŭspiciata de UEA, aliĝis al la tradicio de iamaj SAESToj kaj KAESToj antaŭ jaroj okazigataj en Ĉeĥoslovakio (1978 *Zilina*, 1980 *Ústí nad Labem*, 1981 *Zilina*, 1982 *České Budějovice*, 1984 *Brno*, 1988 *Poprad*, 1989 *Strážnice*, novtempe 1998 *Praha*).

Dimanĉe la 12an de novembro estis dediĉitaj 4 horoj al kolektiva diskuto pri gravaj aferoj ĉirkaŭ la temo "AEST". Mi estis scivolema precipe pri grado de resaniĝo de Terminologia Esperanto-Centro (TEC). En la UK Berlino en 1999 oni ja decidis pri ĝia aktivigo, eble ankaŭ restrukturigo, kaj puŝo al efektivigado de ĝia celo. Mi tiam ankaŭ promesis helpon. Post 4 horoj da entuziasmaj paroloj min ekregis embarasoj. Mi meditis pri rezultoj, serĉis ilin en la memoro ankoraŭ dum pluraj tagoj post la kolokvo, sed vane. Mi provos formuli, kion mi spertis suferi. Komprenu tion kiel averton.

1. Kiel unua priparolata temo estis la demando "Kiu, kie, kiam kaj kiel organizi la venontan KAEST?". Tiu grava, sed tamen akcesora temo okupis du plenajn horojn da svaga babilado por konstati: KAEST 2002 okazos novembre en Prago. Mi estas certa, ke por solvi la demandon sufiĉis kvaronhoro.

2. *P. Chrdle*, la estrarano de UEA por faka kaj scienca agadoj, anoncis, ke post la UK 1999 en Berlino li iniciatis pere de Interreto diskuton pri terminologio kaj restarigo de TEC, sed la rezulto estis nula. Per unufraza konstato li bagateligis la pli ol unujaran diskuton; li ne diris, kiel li la diskuton enkondukis, kian celon fiksis, kiu en la diskuto partoprenis, kiaj estis proponoj ktp. Svaga informo, sed pri detaloj montriĝis neniu scivolo. Mi estas konvinkita, ke iu utiligebla sugesto en la diskuto tamen estus aperinta.

3. Mi tre bone scias, ke TEC neniam funkciis harmonie kun la celoj, ne prezentis iun terminaron kiel modelon. Mi do publike anoncis, ke mi ellaboris konforme kun la ISO-normoj unu terminaron kiel modelon ("Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj"), organizis internacian komisionon por trakti ĝin kaj finlabori (konstru-inĝenieroj el Germanio, Nederlando, Pollando, Slovenio kaj Ĉeĥio) kaj proponas al TEC, ke ĝi la verkon aŭspiciu. La ĉeestantaj reprezentantoj de TEC la aŭspicion rifuzis. Kialon mi ne komprenis. Pri mia kompententeco terminologia kaj faka oni verŝajne ne dubas.

4. Ĝenerale oni scias, ke la ekzisto de TEC nun estas fikcio, dokumentas ĝin sole la jarlibro de UEA. Mi do proponis, ke ni tuj decidu, kiel ni realigos la revivigon kaj aktivigon de TEC. Estas pli facile konstrui sur ekzistanta programa kaj organiza bazo ol nove ion fondi. Sed se la movado ne estas kapabla tion fari, oni honeste likvidu la organizaĵojn kaj ne mistifiku la publikon. En la alparolo mi denove prezentis mian pretecon helpi. La propono estis malakceptita, ĉar la resanigan proceson faru junaj homoj. Fido al la juna generacio estas prava, sed ne estas inde senage kaj naive fidi, ke gejunuloj efektive kaj ĝuste ekagos mem.

5. La kolokvon partoprenis ankaŭ la prezidanto de ISAE, prof. *Sachs*, Lia prelego estis eminenta. La liverita n-ro 181 de Scienca Revuo montras altan nivelon. Sed kiel kompreni la nombron de malpli ol 200 membroj de ISAE? Kion ĝi faras por la evoluo de faka Esperanto? Jam antaŭ preskaŭ 90 jaroj ISAE lanĉis seriozan programon por terminologio per la eldonaĵo: "Konsilaro por la Farado de la Sciencaj kaj Teknikaj Vortoj", *Kötzschbroda-Dresden*, 1911, 80 p. Pluraj ISAEanoj ankaŭ post la dua mondmilito pruvis elstaran agemon por la faka lingvo, *R. Haferkorn, A. Broic, R. Eichholz*. Ĉu vere nun ne eblas fari pli? Projekciante la problemon al la tuta movado, mi bedaŭrinde konstatas okulfrapan malsanon: Esperantistoj estas plene feliĉaj, se ili povas babili. Ankaŭ fakula babilado ne alportas zorgojn.

6. Ekster la oficiala programo preparis por mi neagrablan surprizon iu samideano el la urbo Kladno, kiu min petis pri konsilo, kion fari kun la faka biblioteko de iama Scienca Teknika Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, el la nuna deponejo nepre forigenda. - Meze de la 1960aj jaroj mi fondis ĉeĥoslovakian sekcion de teĥnikistoj-esperantistoj, je tri jaroj pli frue ol estis fondita ĈEA, kaj arigis preskaŭ 200 kunlaborantojn. Baldaŭ poste mi fondis la bibliotekon, kiu vere funkciis kaj atingis fine 499 titolojn. En la 1990aj jaroj ĈEA la sekcion strategie gvidis al likvido kaj, kiel mi en KAEST spertis, la bibliotekon malzorgas.

7. En 1986 la supre nomita sekcio organizis internacian kurson pri terminologio en la urbo *Roudnice nad Labem*. Mi tiam kompilis 88paĝan Terminologian Kurson kiel lernolibron. Parto de la eldonkvanto kuŝas en la libroservo de ĈEA. Pri la lernolibro montriĝis intereso en KAEST, unu ties sekcio ja estis terminologia. Organizantoj de KAEST la broŝuron al petantoj ne disponigis. Forgeso? Malordo? Intenco?

Pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko mi komencis interesiĝi en la jaro 1966, kiam en la UK en Budapeŝto ekagis "Teknika Ligo", nun jam forgesita. Post longaj jaroj mi konstatas, ke nur sporadaj semoj ĵetitaj en la grundon en pasinteco rezistis kontraŭ nefavoraj kondiĉoj kaj hodiaŭ donas fruktojn. Tamen mi konstatas, ke mian agadon preskaŭ ĉiam sekvis plimalpli pozitivaj rezultoj, ke eblas sukcese lukto. Nun mia aĝo kaj sociaj

cirkonstancoj ne permesas, ke mi faru multon. Tamen ideon mi havas. Kian? Mi nomas ĝin "Iniciato FATo", t.e.

#### Iniciato por Faka Apliko kaj Terminologio:

1. Programa klerigo de junaj adeptoj al science bazita terminologio. Gvidi ilin estas preparita *Jan Werner* kun la celo eduki grupon de junaj esperantistoj kompetentaj por funkciado en TEC.

2. Esploro de faka leksiko en esperantaj vortaroj, precipe difinaj (PIV), cele al malkaŝo de semantikaj kaj morfologiaj eraroj. Listigo de suspektaj kazoj kun komentario por estonta terminologia prilaboro. En KAEST 2000 *J. Werner* la problemon demonstris je la vortoj *latiso* kaj *truso*. En Esperanto estas multe da vortoj, kiuj estas fakaj nomoj kaj aspiras fariĝi terminoj, sed ties svagaj kaj eraraj difinoj baras tian evoluon.

3. Registrado de nocioj vakantaj en Esperanto. La registro estos divita al bazaj UDK-klasoj resp. subkaloj alfabeto laŭ anglaj ekvivalentoj. Ĉiun noción sekvas difino, priskribo aŭ citaĵo. La kolekto servos por estontaj terminologiaj laboroj.

4. Fondo kaj estrado de inventar-listo de la tuta faka literaturo en Esperanto (memstaraj verkoj, tekstoj en kolektoj, artikoloj en gazetoj). Formo de la bibliografiaj notaĵoj sekvas la ISO-normojn kaj bazan dividon laŭ UDK, interne de unuopaj klasoj/subklasoj estos verkoj aranĝitaj alfabete laŭ aŭtoroj.

5. Aktiva subteno de aŭtoroj. Produktoj originalaj kaj tradukaj estos disponigataj al aktualaj fakaj gazetoj, eventuale ofertataj al esperantista forumo ĉu interrete ĉu kiel kopioj de originalo deponita ĉe administranto.

6. Aperigado de informilo almenaŭ unufoje jare (papere kaj interrete) kun resumo de ĉiuj rezultoj akiritaj en la "Iniciato FATo".

La ideo "Iniciato FATo" estas programita vaste, tamen, malgraŭ interdependeco de unuopaj punktoj, ĉiu el ili povas starti memstare, esti administrata de unu homo aŭ de kolektivo. Pri realeco de la iniciato kiel tuto mi estas skeptika, tamen mi alvokas kunagantojn. Ĉeĥo *Miroslav Malovec* estas preta kunlabori en la bibliografio (4-a punkto), kiu estas parenca al la registra iniciato realigata en Budapeŝto, prezentita en KAEST 2000. Konsciente la modestan realon, mi estos kontenta eĉ pri minimuma resonado je tiu ĉi teksto, ekz. se aliĝos ĉe mia adreso kelkaj junaj esperantistoj por terminologia kunlaboro.

Se iu el la esperantista komunumo scios mian programan skizon riĉigi, detaligi kaj samtempe proponas sin por helpi, mi estos ĝojigita.

*Jan Werner*  
*Kroftova 84*

*CZ - 616 00 - Brno / ĈEĤIO*